


Sennacieca  
Revuo

2014





# Sennacieca Revuo



*Sennacieca Revuo estas eldono de SAT*

*Asocia sidejo de SAT*

67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: +33 9 50 71 01 97

satesperanto@free.fr

www.satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 BIC: PSSTFRPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

*Plenum-Komitato de SAT*

Prezidanto: Vinko Markovo

Vic-prezidanto kaj eldonestro: Guy Cavalier

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque

Respondeculo pri kongresoj: Arturo Prent

Cetera membro: Brandon Sowers

*Sennacieca Revuo*

Redaktoskipaj kunordigantoj: Robin' Beto, Vinko Markovo

Enpaĝiganto: Gilo Pérez

Ceteraj redaktantoj: Nikolao Gudskov, Djémil Kessous, Petro Levi, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José María Salguero (Kani), Rikardo Schneller, Franciska Toubale

*Kontribuojn por ambaŭ gazetoj sendu elektronike al*

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROIS A, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas ĉiujare. Parution annuelle.

Le directeur de la publication : Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono*: Francio 57 eŭroj

Autres pays — *Aliaj landoj*: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution : n° CPPAP 0515 G 86567

Suppl. au n° 7-8 (1309-1310), juillet-août 2014, de *Sennaciulo*

# Enhavo

1	Prezento (Vinko Markovo)	5
2	La poezi-difino (Antonio Marco Botella)	7
3	Tutmondaj lingvoj en Vikipedio (Kani)	17
4	Kial kaj kiel verki sciencpopularajn librojn en Esperanto? (Nikolao Gudskov)	27
5	Transskribo de propraj nomoj helenaj (escepte de nomoj hebredevenaj) (Francisko Degoul)	33

# Prezento

Vinko Markovo

Kara leganto,

Rigardante la temaron pri tiu ĉi numero de *Sennacieca Revuo*, vi eble unuavide surprize konstatos, ke la artikoltitoloj ne anoncas temojn, kiuj tuj aspektas ligitaj kun laboristaj bataloj aŭ socipolitikaj aferoj. La kontrasto aperos aparte granda se vi nur antaŭe foliumis la pasintjaran eldonon, en kiu tiutipaj tekstoj aparte abundis. El multjara perspektivo, eblas diri ke la ĉi-jara artikol-kolekto fakte restarigas la kutiman ekvilibron.

Ja la celo de *Sennacieca Revuo*, kiel de ĉio produktita de SAT ĝenerale, estas kultura kaj kleriga. Politika kaj laborist-movada kulturoj estas gravaj partoj de kulturo ĝenerale, kvankam la relative ofta konfuzo inter kulturo kaj arto tendencas forgesigi tion. Sed kulturo ankaŭ tuŝas la ceterajn kampojn de la homa agado. Ĉiuj el ili nepre diversgrade rilatas kun la socipolitika kunteksto, en kiuj ili disvolviĝas, sed ili ankaŭ meritas atenton pro siaj propraj „neŭtralaj“ ecoj. Ebligante pripensadon pri plej diversaj temoj, ili helpas al flegado de mensa malfermiteco. La ĉi-numeraj artikoloj ilustras tion.

Ĉiuj, kiuj iom informiĝis pri la pasintjara SAT-kongreso, sendube scias, ke poezio estas „armilo ŝargita per futuro“. Jen jam klara sprono al legado de la artikolo de Antonio Marco Botella pri la poezi-difino. Verŝajne ĉiuj ankaŭ konscias, ke lingvaj demandoj havas ankaŭ politikan flankon. Tion rekte traktas, interalie, la observoj de Kani pri tutmondaj lingvoj en Vikipedio. Espereble ili ankaŭ kuraĝigos vin partopreni en tiu ĉi ampleksa kunlabora projekto. Kial kaj kiel verki sciencpopularajn librojn en Esperanto? Tion respondas Nikolao Gudskov, donante samtempe superrigardon pri la tiurilate havebla literaturo. Al liaj klarigoj pri la kialoj, kiujn vi mem malkovru en la artikolo, eblas substreki, ke ioma informiteco pri natursciencaj aferoj nur povas helpi al pli enhavoriĉaj interŝanĝoj pri ĉio rilata al la vivmedio de la homaro. Legantojn sen forta intereso al lingvoscienco eble iom timigos la artikolo de Francisko Degoul pri transskribo de propraj nomoj helenaj. Al ili mi rimarkigas, ke inter tiuj propraj nomoj kaŝiĝas ne nur mitologiaj figuroj, sed ankaŭ gravaj referencoj al plej diversaj okazaĵoj en la tiamaj socioj. Do jen enirpunkto al eventuala studado de nun plejofte forgesitaj eventoj. Plie, ĉi tiu artikolo ankaŭ donas ekzemplon pri la maniero sistemece trakti iun ajn transskriban problemon, kio povas aperi en plej diversaj kampoj.

Mi deziras al vi agrablan legadon kaj eventuale pripensadon pri kontribuo al la venontjara eldono.

## Pri la pasintjara kovrilpaĝo

Ni ricevis la jenan legantoleteron:

*Karaj*

*Dankon pro la sendo de nova numero de S.R. kun tre interesa enhavo.*

*Perpleksigis min la bildo kiu ilustras la kovrilon de la revuo. Kutime tiu mapo (bildo) prezentiĝas kun la nordo supren. Ĉu la inversaĵo estis intenca? Ĉu eldoneraro?*

*Pardonu la temporabon el via laboro.*

*Amike,*

*Alcino Ramos Alves*

Respondo: la inversigo de la mapo ja estis tute intenca. Tion eblas interpreti diversmaniere. Ekzemple kiel atentigon, ke eĉ aferojn ŝajne plej kutimajn eblas vidi el tute alia perspektivo pere de nur simpla ŝanĝeto. Aŭ kiel instigon al renverso de la monda sociordo. Aŭ per multaj aliaj manieroj. Ĉiu leganto mem elektu laŭ sia prefero.

## Noto pri numerado de pasintaj eldonoj

Dum la pasintaj jaroj ekde 2008, en la urĝo de la redaktoskipa laboro perdiĝis la kutimo numeri la sinsekvajn eldonojn de SR. Por faciligi la orientiĝon de tiuj, kiuj deziras havi superrigardon pri la plena sinsekvo de pasintjaraj eldonoj, jen ĉi-sube indiko pri la mankantaj numeroj:

2008	n-ro 136
2009	n-ro 137
2010	n-ro 138
2011	n-ro 139
2012-2013	n-roj 140-141

# La poezi-difino

Antonio Marco Botella

**N**E estas mia celo fari de mia prelego<sup>1</sup> instruan lecionon pri kiel difini poezion, tute ne, mia modesteco vere ne permesus al mi preterpasi la limon, kiu signifas, la menciojn de opinioj de elstaraj intelektuloj kaj poetoj. Maksimuma pretendo mia estas, esprimi tion kion mi pensas pri tiu ĉi temo, kaj tiu estas la simpla opinio de persono kiu admiras kaj profunde amas poezion de ĉiam.

Kaj en tiu punkto mi finas la priskribon de la celo de mia prelego kaj komencas mian paroladon esprimante la klasikan pripoezian difinon, kiu diras, ke poezio estas emociiga interpreto de certaj sentoj esprimataj per bela lingvo, sed... ĉu tio sufiĉas por klarigi tiun emociigan belan esprimon? Evidente ne.

Oni ne povas difini ĝin kiel oni faris antikve kiam oni diris, „poezio estas beletra esprimo per versoj“: ja Aristotelo en sia libro „Poetiko“ konsideris erara tiun opinion. Estis aliaj opiniantoj, kiel Edgar Poe („poezio alproksimiĝas al muzika esprimo“), Verlaine pli firme konfirmis ke, „poezio estas muziko“, kaj ne malmultaj opiniis „poezio estas arta esprimo envolvita de magia parolo“.

En la mallargaj limoj de tiuj difinoj, oni ne povas enmeti la profundan sendon de tiel alta koncepto kia poezio, pro tio oni min permesu uzi aldonajn eksplikojn, eĉ laŭnecese helpi min per niaj viveroj, sentoj kaj emociigaj momentoj, kiuj ofte batas nian koron kreante tute novan senton, kiu ne plu estas la simpla realaĵo kiun ni elektis por nia difino.

Tiel ĉi realiĝas fenomeno, kiu konsistas el tio, ke io reala kun karaktero simpla kaj sentemo profunda, eniras en nian koron kaj transformiĝas en muzikan sonon envolvante per fantazio la esprimon de riĉaj sentoj kaj lirika ritmo, kiuj ne plu estas tiu simpla realaĵo de nia vivero, ĉar tiam la parolo ne aperas nuda, sed brilas per belsonoj, koloro, ritmo, muziko, kaj iu emocio, tio ĉi estas ja poezio.

Jam en tiu ĉi ŝtupo de nia difino, ni povas menciigi ion, kion mi legis tre, tre juna: „Poezio estas verso de García Lorca, melodio de Beethoven, legendo de Bécquer, okulfrapaj frazoj de Rabindranath Tagore, estas la lingvo universala kaj unika kun parfumo de beleco kaj rava muziko plenaj je emocio“.

1. Simile al tiu ĉi prelego, pri sama temo, mi prelegis ene de la programo de la 59-a SAT-kongreso okazinta en Sant Cugat del Vallès en la jaro 1986.



Sed la transformiĝo de io reala en poezion ne estas fenomeno aperinta en la sino de iu ajn persono, tute ne, oni bezonas spiriton kaj sentemon specialajn, similajn al tiuj de la grandaj poetoj, kiuj ĉion, kion ili tuŝas, transformas al bela poezio. Nia pretendo difini ĝin restas, tiel malfacila kiel je la komenco, kaj tio estas historia malfacilo, kaj jen ekzemploj de kleruloj antaŭ tiu demando.

Kiam Gerardo de Diego demandis „kio estas poezio?“ al nia eksterordinara poeto García Lorca, majstro en uzado de metaforoj, tiu ĉi surprizite respondis:

Kion mi povas diri al vi kiel respondon? Ĉu difini, kio estas tiuj nuboj, aŭ tiu ĉielo, aŭ tiu rumoro de la proksima arbaro? Mia respondo povas esti: rigardi, rigardi ilin, observi ilin, kaj nenion plu. Komprenu ke al poeto estus malfacile tiujn difinojn doni; lasu tion al profesoroj kaj fakuloj pri tiuj temoj, ja estu certa ke mi — kaj ankaŭ vi mem, aŭ aliaj poetoj — tute ne kapablas difini kio estas poezio.

Kaj García Lorca daŭrigis kvazaŭ parolante al si mem:

Mi komprenas ĉiujn poemojn, mi povus paroladi pri ili dum horoj kaj horoj, mi povus ankaŭ paroli pri muziko, ĉu ĝi plaĉas aŭ malplaĉas al mi, aŭ pri fantazioj inventitaj en mia cerbo kiel povus esti „la pasintan nokton oni bruligis la belan Partenonon kaj mi dolore observis tiun katastrofon“, sed difini kio estas poezio, tio ne estas demando por ke poeto respondu tiel rapide kiel eble vi pretendas...

Kiel vi povas konstati, la poeto sin sentis tute ne kapabla respondi, li simple nur parolas, kaj — kiel akvo el fonto — el la parolo floras la poezio, kiu tuj brilas kaj kantas. Ja li kreis senpene poezion kaj ĝi ŝprucis perfekte el lia cerbo, tiel facile kiel Minervo naskiĝis saĝa el la menso de Jupitero.

Ankaŭ je la fino de la pasinta jarcento, la poeto Bécquer, ricevis saman demandon de belulino dum ŝi prezentis al li albumon. La poeto, senhezite, rigardante ŝin ravite, skribis sur la senmakula paĝo de tiu albumo:

Kio estas ja poezio  
vi al mi demandas  
fiksante en mia pupilo  
vian belan blupupil'  
Kio estas ja poezio?  
Kaj vi tion al mi demandas?  
Poezio, certe, estas vi!

Ĉu ekzistas pli bela esprimo por respondi tiun demandon? Certe en tiu momento, ne. Kaj la fenomeno ripetiĝas kiel vi povas konstati: poetoj ne difinas, ne scias difini laŭ reguloj de fakuloj ĉar ne konas la ordinaran lingvon. Ilia parolo, anstataŭ difini, saltas en la aero en miloj da pecoj, kaj ĉiu peco, ĉiu vorto estas kvazaŭ floro kiu parfumas sian ĉirkaŭon esprimante laŭ la originala maniero de la poetoj la ideon pri poezio.

Ni parolis pri poezio ĉe la sojlo mem de la poetika mondo, kaj ni ne sukcesis aŭdi trafan respondon eĉ de la poetoj mem. Nun ni konsultu de talentaj kritikistoj la opinion. Ni citu kiel la unuan ekzemplon la poeton, filozofon kaj verkiston, Miguel de Unamuno, kiu tuj kiam oni parolis pri poezio insistis indikante al la poetoj „oni devas verki ĝin kun pli da denseco“ kaj aldonis: „oni devas pensi tion, kion oni sentas, kaj oni sentu tion, kion oni pensas“, t. e. ke oni startu el la poezia realo. Unamuno, sincera en lia teorio, verkis poezion laŭ lia penso, konstata vi mem per la sekva peco de li.

Temante pri psikologia reago en problemoj tiel kompleksa kiel tiu pri amo kaj morto, ĝi estas verkita en neriproĉeblaj versoj, kiuj rakontas la sentojn de unu el la vivantaj amantoj, kiam la alia forpasis unue:

Oni mortas tiu kiu vidas vizaĝon dian,  
ni ambaŭ kune vidis ĝin,  
vi jam forpasis, amo mia!,  
mi ankoraŭ en dezerto vivas  
revante ĉiam postsekvi vin...

La poezio de ĉi versoj ne brilas pro retorikaj formaj figuroj ekzaltantaj la doloron de la amanto antaŭ la forpasinta amatino. Malaperas fantazio, anstataŭite de realismaj sentoj, sed la poezio vibras je la espero de la sopiranta amanto. Certe, kelkaj poetoj ne konsideras tion ĉi pura poezio, ĉar Unamuno antaŭmetas kiel premison la elstaran signifon de la ideoj, profundigon de la sentoj kaj belecon en la konceptoj.

Aliaj poetoj ne samopinias kiel García Lorca aŭ Miguel de Unamuno, ĉar ili uzas alian stilon, kaj kreas poezion kiu ne emfazas la konceptojn, la versoj akiras ĉiutagecan sencon, malaperigas la simbolojn, kiel ekzemple fratoj Machado. En poemoj de Antonio Machado, ni tuj konstatas, ke li atingas la poezian idealon konsistanta el ĝia prezento nuda je pitoreskaj rebriloj, montrante per apenaŭ percepteblaj rimo kaj ritmo la belecon de la konceptoj, kiujn li volas esprimi. Jen unu el la poemoj klare montranta la karakterizojn menciitajn:

Estis certa nokt' de majo  
obskur-blua kaj serena,  
sur l' akuta cipres-alto  
brilis luno beloplana  
lumigante la fontanon  
sola en la nigro densa,  
el ĝi ŝprucis kristalakvo  
kun sonado tre kadenca...

Poste, kanton oni aŭdis  
el kaŝita najtingalo...